

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

N-ro 6 \* 30. Sept. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

Eliras provizore dufoje en la monato;  
depost Novembro 1920 ĉiusemajne.

## 1-a Postmilita Revela Kongreso en Düsseldorf.



Urba Széchenyi-Banejo en Budapeŝt.

Ĉi-supre ni daŭrigas la serion de vidaĵoj el la hungara ĉefurbo per bildo de la Széchenyi-Banejo en la urba arbareto de Budapeŝt. La Fremdul-Oficejo en Budapeŝt volonte pruntedonas klišaĵojn pri Budapeŝt. Ilustritaj gazetoj, kiuj deziras publikigi bildojn pri la hung. ĉefurbo, skribu al la *Fremdul-Oficejo en Budapeŝt* (Idegenforgalmi, IV, Harisköz 1).

Düsseldorf, bela urbo apud la Rejna bordo, urbo de verdaleaj stratoj kaj vastaj parkoj, urbo de arto kaj industrio, vin ni estis destinintaj urbo de nia unua postmilita Revela kongreso. Ne vi invitis nin veni al via vizito, ni mem estis nin invitintaj. Do ni eble ne bezonis miri pri tio, ke ne estis trovebla iu ajn „stelisto“ (ne elparolu la „s“ bavare = „š“) por akcepti nin ĉe la staci-domo, nek pri tio, ke neniu aŭiso, neniu steleto indikis al ni la vojon al la kunveno aŭ la kunvenoj mem. Tamen plenkuraĝe ni ekserĉis la „Luisenschule“, kie estis okazonta la matena kunsido. Post ioma tramvoja erarveturo diversdirekten kaj post plua kelktempa erarpromeno tra diversaj stratoj ni fine sukcesis trovi ĝin. Ni provis eniri la imponan konstruaĵon tra tri pordoj; du el ili estis ŝlositaj, la trian ni trovis malŝlosita. Ni tuj surgluis kelkajn sigelmorkojn, por ke la post ni venontaj samideanoj vidu, ke ĉi tiu ĉi pordo estas la vojo al la laŭdata lando Esperantujo, kaj renkontis interne s-ro'n d-ro'n Müller, kiu estis sola aranĝinta la kongreson.

Baldaŭ alvenis la kongres-partoprenontoj de ĉiuj flankoj: el Köln, Godesberg, Stolberg, Essen, Elberfeld ktp., kaj rapide pleniĝis la malgranda lernejoĉambro, kie la kongreso estis malfermota. Oni interŝanĝis korajn salutvortojn, manpremojn kaj ĝojesprimojn pro la revido. Estis vidataj multaj novaj vizaĝoj de samideanoj, kiuj nur de post la militfino lernis nian belan lingvon kaj nun starigas sin en la vicon de la malnovaj batalantoj por kune kun ili ataki la indiferentan mondon aŭ defendi nin kontraŭ la mokemo kaj malamikeco de la malesperantistoj.

Je la 11 h. am. s-ro Junker (Köln) kiel Revelo-Komitestro **malfermis la Kongreson**. Kiel prezidanton por la kongreso oni elektis d-ro'n Müller, la aranĝinton, kaj kiel protokolonton s-ro'n Jung (Horrem).

Pro momenta malhelpo de d-ro Müller, tiu ĉi estas anstataŭata de s-ro Junker, kiu prenas la vorton dirante, ke post la milito estas la unua fojo, ke ni kunvenas tiel grandnombre. Li salutas la kunvenintajn grupojn kaj izolulojn; li ĝojas pri la granda vizito kaj esperas, ke Revelo denove ekfloros kaj baldaŭ reakiros sian forton kaj famon kiel antaŭ la milito. En la nomo de la prezidanto li malfermas la kunsidon, dum kiu estas plenumitaj nur kelkaj malgravaĵaj formalajoj.

**Propaganda Mateno** okazis je 11.30 h. en la ampleksa aŭlo de la sama lernejo, tro ampleksa por pleniĝi per la malgranda aro de la samideanoj (eble 80); ĉar bedaŭrinde la nombro de la aliaj vizitantoj estis ankoraŭ pli malgranda. Mi ne scias la kaŭzon de tiu malbona vizito; eble ĝi estas ŝuldota al la dummatena aranĝo.

Post kelkaj kantoj de s-ino Wansart-Heins en nia melodia lingvo, forteplane akompanataj de d-ro Müller kaj multe aplaudataj (precipe „Tagiĝo“), kaj post deklamo de la monologo el „Inĝenio“ per s-ro Barthelmess, s-ro Pillath (Essen) eniris la katedron por unuhora germanlingva **Parolado** pri la temo: **La lingvoj en la nova Eŭropo**. Li diris, ke la kulturo celas je unuecigo, sed ke la nombro de la kulturlingvoj kreskas. Li nomas Esperanton Alt-Eŭropa Lingvo. Li finas per atentigo je la venonta Interpola Ligo, prave konkludante, ke Interpola Ligo sen Interpola Lingvo estas ne-imagebla.

Riĉa aplaŭdo rekomencis la oratoron pro lia longa kaj konvinka parolado, kiu estis nur iom lafa por mateno.

Post la propaganda mateno la partoprenintoj vizitis en apuda lernejoĉambro **Esperanto-Ekspozicion**, kiu estis riĉe provizita. Tie ankaŭ estis aĉeteblaj Esp. lernolibroj kaj gazetoj.

La daŭrigo de la **Labor-Kunsido** okazis je 3.15 h. en ĉambro de „Goldener Ring“, Burgplaco.

Post malfermo de la kunsido per la prezidanto d-ro Müller, oni konstatis ĝis la reprezentatajn grupojn kaj izolulojn kun jena rezultato: Esperanto-Grupo 1910 Essen, Esperanto-Societo 1906 Köln, Esperanto-Societo Hagen, „Godea“ Godesberg, la grupoj Bochum, Elberfeld, Hagen, Horrem, Koblenz, Siegburg-Beuel, Stolberg, Esperanto-Grupo 1907 Düsseldorf kaj „Verda Stelo“ Düsseldorf, izoluloj ĉeestis el Bottrop, Buer, Dortmund, Duisburg, Gelsenkirchen, Krefeld, Menzelen, Weiden kaj Wipperfurth. Entute estis reprezentataj 20 lokoj.

**Salutoj** telegramaj, literaj kaj poŝtkartaj estis alvenintaj de Germana Esperanto Asocio (d-ro Steche), Germana Esperantisto (Ader & Borel), Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj (s-ro Mielert), Franca Esp. Ligo, grupo Bamberg, illepo (supera poŝta konsilisto Otto Reber), Esp. grupo Gummersbach, ges-roj Krestanoff, K. Tuschinski el Danzig kaj Al. Schwarz el Charlottenburg.

Post la decido de la ĉeestantoj, ke la debato estu en Esperanta lingvo, s-ro Junker referas pri la agado de Revelo kaj de l'Revela komitato post la militfino. Li atentigas pri la antaŭmilita florado de Revelo kaj pri la provoj, kiujn li faris kune kun s-ro Jung precipe per reapero de la gazeto „Progreso“ por revekigi la ligan. Post komenca sukceso la intereso denove malgrandiĝis, „Progreso“ ree malaperis, eĉ „Germana Esperantisto“ preskaŭ mortis, kaj kelkan tempon Revelo nur vegetadis. Nur antaŭ kelkaj monatoj la Revela komitato interkonsentis aranĝi la aferon alimaniere por revekigi la intereson, kaj okazigis diversajn amikajn kunvenojn de samideanoj el najbaraj lokoj en Köln, Godesberg, Düsseldorf, Stolberg, Maria Laach kaj Horrem. Precipe interesa estis la bonvizitita kunveno en Düsseldorf, kie oni decidis la okazigon de la hodiaŭa Revela kongreso. Referanto finas per la deziro, ke nun Revelo eliru definitive el la tombo kaj restu viva kaj sana.

La prezidanto d-ro Müller dankas al s-ro Junker kaj Jung pro la revivigo de Revelo.

Nun oni pritraktis la proponon de s-ro Junker, ke estu elektota centre lokita komitato, kiu okupiĝu per la restarigo de malnovaj kaj starigo de novaj grupoj. Post kelka debato estas akceptata kontraŭpropono Hurler (Köln), ke la agado por Esp. estu farota ne per komitato nove elektota, sed per la grupoj kaj esperantistoj mem en ĉiama kontakto kun la Revela estraro.

La grupo Stolberg faris jenan proponon: Oni bonvolu pritrakti la intencitan **novan propagand-manieron de GEA** publicitan en „Esperanto“ Julio/Aŭgusto 1920, paĝo 149.

Vigla debato ekeŝitis pri tiu propono, kiun oni opinias tro frua.

S-ro Hurler kaj Junker kredas, ke samtempa propagando en ĉiuj urboj ne estas ebla, ekz. en Köln je karnevala tempo aŭ en München je la oktobro-festo tiu propagando estus senefika.

S-ro Jung opinias, ke tio estas esceptoj kaj ke en tiuj urboj oni povas prokrasti la propagandon je kelka tempo. Ankaŭ li konsentas, ke la propono estas tro frua kaj ne sufiĉe preparita. Tia tutmonda propagando bezonas tutan jaron de preparado. Ĉiuj naciaj asocioj devas komune presigi unu saman cirkuleron kun unu sama teksto en la diversaj naciaj lingvoj kaj kun iom precizigita indiko kiom da asocioj kun kiom da membroj en kiom da urboj kaj landoj ricevas tiun ĉi saman cirkuleron kun la invito partopreni en la lernado kaj poste en la utiligo de Esperanto, kaj kun la certigo, ke post la finigo de la kursoj en ĉiuj landoj, t. e. post 6 monatoj, estos eldonata adresaro de la tutmondaj kursanoj kaj fondata internacia fak-organizaĵo. Tiamaniere preparite, la propagando ne povas resti sen sukceso.

Poste oni debatas pri la proponoj Jung, ke estonte okazu ĉiujare du Revelaj kongresoj, ke Revelo invitu la proksiman germanan Esp. kongreson al urbo en Revela teritorio, kaj ke en 1921 oni aranĝu **universalan antaŭkongreson en Köln** kaj karavanan de Köln tra Germanujo al Praha.

La unua kaj tria proponoj estas akceptataj sen longa diskuto. Pri antaŭkongreso en Köln, oni kredas, ke la anglaj, holandaj, belgaj kaj francaj samideanoj, veturonte al la kongreso de Praha, volonte kolektiĝos en la Rejnlanda metropolo por kune daŭrigi sian kongresvojaĝon tra Germanujo.

Pri la dua propono ekestas vigla debato, kiu rezultigas, ke oni volas proponi Essen kiel lokon por la **germana kongreso 1921**. La grupo Essen deklaras, ke ĝi estas preta aranĝi la venontan kongreson, sed ne povas akcepti antaŭklarigo de la financa flanko. Sen mono oni ne povas aranĝi sukcesplanan kongreson. Estus necese, ke ne sole GEA, sed ĉiuj gravaj grupoj subtenu la Essen-anojn, ĉar la kongreso estas por tuta Germanujo.

Oni decidis unanime, ke la Revela estraro proponu (kun kelkaj rezervoj) al GEA, okazigi la kongreson 1921 en Revela urbo.

S-ro Pillath petas, ke Revelo destinu samideanon, kiu akceptu anecon en la konsilantaro (Beirat) de GEA, kiun la estraro de GEA fine proponis al li, sed kiun li jam ne povas akcepti pro certaj kaŭzoj. La kongreso komisiis la grupon Essen destini iun taŭgan samideanon el sia mezo.

Post tio estas elektita la prezidanta grupo de Revelo. Oni proponas Essen, Köln kaj Godesberg. Post la rifuzo de Essen, kiu pro eventuala akcepto de la kongreso ne povos preni sur sin pluan respondecon, kaj post la deklaro de Köln, ke ĝi estas preta plenumi la ĝis nun faritan laboron ankaŭ en la venonta jaro, oni unuanime elektas Köln. Do Revelo nun ree havas plene rajtigitan estraron, kaj estas granda konfido de la anoĵ, ke oni transdonis la estrecon denove al Köln, kiu ĝin plenumis iom diktatore dum la lasta jaro.

S-ro Pillath profitas de la okazo por danki al la ĝisnuna Revela komitato, aplaudata de ĉiuj kongresanoj.

S-ro Junker dankas en la nomo de la Revela komitato pro la konfido kaj pro la dankaj vortoj de s-ro Pillath, kiuj estas nova instigilo al aga laboro. Li esperas, ke el tiu laboro rezultos, ke en venonta printempo tiu ĉi ĉambro ne sufiĉos por la kongresanoj.

Nun sekvis diskutado pri la kotizajoj. S-ro Junker klarigas, ke estas necese fiksi jaran kotizon de 2 mk. po membro, kiu fine estas akceptata.

Al la punkto „Diversaĵoj“ s-ro Junker esprimas la deziron, ke ĉiuj grupoj kaj izoluloj aliĝu ĉe GEA.

S-ro Pillath sciigas, ke la firmo Ader & Borel volas eldoni de li kompilitan kaj parte memverkian kanlibron. Tiu ĉi sciigo estas ĝoje salutata de la ĉeestantoj.

Poste estas ankoraŭ preparolata la situacio en Menzelen, kie Idano malhelpas la propagadon de Esp. ĉe la popola alternejo. S-ro Schneider, prezidanto de la laborista grupo Düsseldorf, promesas helpon.

Fine s-ro Poensgen dankas kun aplaŭdo de ĉiuj kongresanoj s-ron d-ron Müller pro la arango de la kongreso, kiun li faris preskaŭ sola. Je 5.30 h. la kunsido estas fermata.

Post la kunsido okazis komuna promonado tra la belaj stratoj kaj parkoj de la urbo. Bedaŭrinde ĝuste dum la promonado iom pluvis, dum antaŭe kaj poste brilis la suno de la ĉielo.

Vespere la plimulto de la kongresanoj kunvenis, atable invititaj de la laborista grupo, en ĉambro de restoracio Schmitz (Wehrhahn), kie oni babladis kaj kantis nian entuziasman himnon „La Espero“. S-ano Klafs (Düsseldorf) kantis Esp. kanton, kaj s-ano Pillath deklamis kelkajn Esp. poemojn, kiuj montris la belsonĝon de nia kara lingvo.

Certe la Revela kongreso en Düsseldorf rezultigis grandan sukceson por nia movado en tuta Rejnlando kaj Vestfalio. Ne ŝule, ke ĝi donis al ni la delonge deziratan rajtigitan estraron, kiu povos efektive kaj aŭtoritate labori, ĉar ĝi apogas sin sur la konfido de la membroj, — la multaj partoprenintoj el preskaŭ ĉiuj gravaj urboj de Okcidenta Germanujo kunprenis de la kongreso en siajn lokojn novan entuziasmon, novan fervoron, novan laborforton. Ili konsciigis, ke Esperanto ne mortis, ke ĝi vivas kaj mirige progresas tie, kie la ĝustaj personoj verbas kun la necesa entuziasmo kaj fervoro, kiel ni fion vidas en Essen. Tie sen iu ajn reklamo aŭ propagando kaj nur per buŝa varbado anoncis sin jam pli ol 40 partoprenintoj por nova kurso. Samideanoj ĉe en Rejnlando kaj Vestfalio, laboru vi same kiel la Essen'anoj, tiam nia Revelo baldaŭ havos 1000 membrojn aŭ pli anstataŭ la nunaj 300. Antaŭen kun kuraĝo kaj konfido! REVELANO.

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

(5-a daŭrigo.)

La Loziŝĉanoj preskaŭ ploris, sekvante per la okuloj tiun maran giganton, forbrantitan de antaŭ iliaj nazoj ilian virinon.

La homamaso estis disiĝanta, kaj la altkreska Germano demetis sian rondan ĉapeton, viŝis per poŝtuko la ŝvitkovritan vizaĝon, aliris al la Loziŝĉanoj kaj ekridetis, etendante al Mateo sian grandegan manon. La viro videble ne estis vengema: kiam finiĝis la interpuŝigo ĉe la bordo, li ŝanĝis siajn manierojn kaj, krebdeble, deziras danki la Loziŝĉanojn por la donaco.

„Jen kia vi estas!“ diras al li Dima. „Nun vi salutas, kiel bonulo, sed pripensu do, kion vi al ni faris: fratino nia forveturis sola! Iru al la diablo!“ li kraĉis kaj kolere sin forturnis de la Germano.

Dume la ŝipo estis jam malproksime; ĝi denove eligis kolonon da fumo, fariĝis ĉiam pli kaj pli malgranda kaj baldaŭ ne nur S-inon Loziŝĉanska, eĉ la ŝipon ne estis eble distingi per okuloj inter aliaj ŝipoj ĉirkaŭvolvitaj de nebulo. Ambaŭ viroj sentis fiklon en la gorgo. „Hundo, vera hundo“, alparolis Mateo la Germanon.

„He, por kio lin insultis, se li nenion komprenas!“ malbonhumore intermetis Dima. „Se vi ĝustatempe estus doninta al li sur la oreton, eble ni nun ankaŭ troviĝus sur la ŝipo. Kaj se ni nur estus tie, oni ja ne ĵetus nin en la akvon. Tiom pli ke nia fratino havas bileton!“ — „Kiu scias?“ respondis Mateo, gratante al si la nukon. „Por diri la veron, kvankam tute ne estas malfacile doni al li sur la oreton, sed mi en mia vivo

## NOVA KOMPREENO DE LA VIVO KAJ ĜIA PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO. (2-a daŭrigo.)

Por pruvi la aktivecon elektran de la korpo, Hirth unue starigis la tezon, ke nia sango estas elektrolito, ĉar ĝi same kiel la limfo prezentas salsolvajon. Tion la medicino multe tro malmulte atentis. Parolante pri sango, la medicino ĝenerale pensas nur pri ruĝaj kaj blankaj korpetoj de sango, konstateblaj per la mikroskopo. La mirakloj de la mikroskopo tiel perpleksigis la esploristojn, ke ili la ĉefajon, nome la salsolvajon, tute forgesis. Bedaŭrinde eĉ en la medicino la mikroskopuloj havis ĝis nun tro decidan vorton. Kion ili ne povas vidi sub ilia mikroskopo, ne ekzistas por ili: Hirth diris pri tiu ĉi punkto:

„La naturscienco kaj precipe la fiziologio kaj medicino staris kaj staras pligrandparte ankoraŭ hodiaŭ kontraŭ la *salkvo kaj ĝia dinamiko vualita kun senantaŭsenita malsatado*. Ankaŭ la vaporforto estis nur malkovrita, post kiam per jarmiloj ĉiu kuiranta homo povis ekpensi, ke devas esti forto profitbla, per kiu la potkivolo en momento de vehementa vaporigo estas levata.“

Sed la tuta stato de la tekniko pli frue ne tiel estis progresinta, por teknike efektiviĝi pensojn, eble ekestintajn ĉe unuopaj.

Ĉiuj organoj, sen escepto, entenas akvon kaj salojn. Tion oni jam scias deponat generacioj. Sed al tiu ĉi fakto oni antaŭe ne almezuris ian gravan signifon dinamikan. La besta kaj planta fiziologio parolis pri akva ekonomio de la vivestajoj kaj krome pri la elementoj diversaj, konstruaj kaj nutradaj substancoj, el kiuj ĝuste la saloj ĉiam troviĝantaj estis kritikataj tre malfavore konsiderante ilian taskon supozitan. Ankoraŭ antaŭ 50 jaroj multe da kuracistoj opiniis ilin ĝuilo subtenanta la bonguston, sed eĉ malhavebla. Per tiu ĉi eraro ankaŭ la administraro de la pundomo „in der Au“ (en la herbejo) en Munheno estis kaptita, forprenante la kuirsalon de la kondamnitaj. Gravaj malsanĝoj kaj malforto inter tiuj ĉi baldaŭ devigis la administraron reenkonduki la saligadon de la mangajoj. Per eksperimentoj sistemaj je bestoj 1872-a Foerster konstatis, ke permanenta salsalmodono estas mortiga, kaj aliflanke jam tiam la kuracista empirio trovis kelke da revivigantaj ecoj de la salsolvajo; sed eĉ al la granda *Justus Liebig* la fakta bazo de ĉi tiu aperaĵo restis kaŝita, kvankam lia antaŭsenita povo igis lin malaprobri la saldeponon kiel la plej maljustan el ĉiuj impostoj.

La ŝlosilo al la sekreto de la organaj salefikoj estas scienco artaĵo de pli ol unua grado, pri kiu dum la oka jardeko de la antaŭa jarcento laboris longa vico da eminentaj spiritoj. Propriadre estas kelkaj ŝlosiloj al kelke da seruroj, almiĝito de veritabla vulpejo al labirinto. *Hugo de Vries, Hamburger, Van't Hoff, Ostwald, Nernst, Loeb, Cremer* k. a. estis la seruristoj majstroj. La propran „Sesam malferruĝita“ parolis la sorĉisto de la nordo, *Syante Arrhenius*, eltrovinte, ke la ŝargo elektra de la salsolvajo ne nur estas efikata per la fluo elektra de ekstere trakondukata, kiel oni kredis pli frutempe, sed estiĝas tuj ĉe la mikso de salsolvajo kaj akvo, kaŭze de la fendigo de la salmolekuloj en atomojn respektive en ionojn igata per la akvo, ekz. la kuirsalo en natri-kaj klor-ionojn. Kian dinamikan rolon ĉe tio ludas

neniam vidis bonajn rezultatojn de tia agado. Verŝajne, ni ankaŭ ne ĉion bone faris hodiaŭ, kredu al mia parolo! Via devo, Dima, estus konjekti, ĉar oni ja nomas vin saĝa homo!“

Kiel ofte okazas, la amikoj komencis nun kulpigi unu la alian. Dima ripetis: „Oni devus helpi al si per la pugno.“ Sed Mateo kulpigas Diman pri malsprikeco. Dume la Germano staras kaj amike okulsigas al ili ambaŭ.

Poste la Germano elpoŝigas la moneron, kiun Dima estis enŝovinta en lian manon, montras ĝin. Sendube, la viro estas homo konsciencia; li ne volas akcepti trinkomonon senmerite; do li frapetas sin sur kravato, dirante: „ŝnaps!“ kaj montrante per la mano drinkejon, „komprenite?“ Dima ekrigardis Mateon, Mateo ekrigardis Diman kaj diris: „Nu, estas nenio farebla. Certe, ni iru! Sur la maro ni ja ne povas piedpaŝi, kaj ĉi tiu Germana diablo eble scios ion al ni klarigi.“

Ili ekiris. En la drinkejo staris maljunulo kun grizaj haroj kaj neglate razita vizaĝo. Videble estis, ke kiel ajn li razigis al si la barbon, la haroj eligas el la haŭto kiel herbero post abunda pluvo. Ekvidinte tiun malpurulon meze de glataj pure vestitaj Germanoj, niaj amikoj tuj ion ekmemoris. Dima flustris diris: „El Minsko aŭ Mogilevo aŭ eble el Puŝĉi?“

Ili estis pravaj. . . . La drinkejo-mastro alportis kvar kruĉojn da biero — la kvaran por si — kaj sidigis apude. La Loziŝĉanojn li nomis malsaĝuloj kaj klarigis al ili, ke ili mem estas kulpaj. „Vi devus atenti la elpendaĵon de tiu domo, estas skribite „Billeteinkasse“. Bileto — ĉiu malsaĝulo ja komprenas, kion signifas „bileto“, „Kasse“ — nu, ĝi estas kaso! Sed vi vin puŝis antaŭen kvazaŭ brutaro, kiu ne povas malfirmi la baritan pordegon!“

Mateo mallevis la kapon kaj pensis: „Prava li estas: sen lingvo homo similas blindulon aŭ malgrandan infanon.“

la duobla naturo de la mediuo el hidrogeno kaj oksigeno ekzistanta, ne estas ankoraŭ komplete klarigata. Ĉiukaze estas grandioza kuneffiko fizika-hemia de plejparte kvar aŭ pli mineraloj, al kiuj en la momento de ilia geedziĝo aliĝas elektraj energioj. La potencialdiferenco ekzistanta inter la ionoj de dekon-normala salsolvajo ja povas plenumi laboron de 6000 mk.g!

Certe al fia simila fortekloro ankoraŭ apartenas io, donita amase en la vivantaj organismoj, sed ĝis nun neatenata kaj malflosota al la scienco pri la vivo nur per la eksperimento organa: 1-e *maŝino*, en la plej vasta senco de la vorto. Ĉiu vivanta organismo reprezentas tian; ja en la pli alta bestomondo ni trovas grandan nombron da iloj en ĉiu individuo, estantaj nenio alia ol aparatoj por produktado kaj utiligado de potencialoj. La energioj elektraj de la salhidrato, kiuj en vazo per salkvo plenigita tiel same kiel en la oceano dormetas en senaga ekvilibro, estas aktivigataj interne de la organismo per ĝia konsrudo, per membranoj sennombraj, per angivandoj kaj organoj, per ĉeloj, ktp.

Nia korpo do havas eksterordinaran similecon je galvanica elemento, en kiu oni trovas du kondukilojn unua-klasajn — ekz. zinkon kaj karbon — kaj unu kondukilon dua-klasan, la tiel nomitan elektroliton, nome la salsolvajon.

Same tiel estas en la homa korpo. Sango kaj limfo estas elektrolito, el kiuj la korpo resp. la ĉeloj prenas sian elektran forton. La ĉeloj kaj nervinaj iloj laŭ-pulse diferencigataj, trempas en ĉi tiu fluidaĵon elektrolitan, tiel same kiel zinko kaj karbon ĉe la galvanica elemento.

(Daŭrigo.)

D-ro W. WINSCH.

## Plenan Liston de Abonantoj

ordigitan laŭtande kaj laŭurbe, ni publikigos en novembro kun precizaj indikoj, por kiom da numeroj pagis ĉiu abonanto.

La n-roj 1 kaj 2 de ET estas elĉerpitaj; kiu posedas oblajn ekzemplerojn, estas petata resendi ilin.

La manko de spaco en nia jurnalo fariĝas preskaŭ katastrofa; do estas nepre necese, ke ET eliru ĉiusemajne kiel eble plej baldaŭ.

### Gesamideanoj!

Antaŭ nelonge ni ricevis de nia korespondanto en Kovno (Litovujo) skribon, en kiu staras la sekvanta plendo:

La 17 junio estis en nia urbo granda brulejo, kiu forbruligis ĉirkaŭ 200 domojn, interalie la domon, kie estis la ĉjo de nia Esp. societo. Ĉio pereis! Neniu restis! Ni estas vere malfelicaj! Dum la milito estis forrabita nia bela biblioteko (2000 libroj) kaj tuta nia havaĵo, meblaro ktp. Antaŭ unu jaro (1919) ni restarigis la societon, aĉetis librojn ktp. En la biblioteko estis jam 250 libroj, — kaj jen! ree ni estas ruinigitaj. Granda mizer! Denove ni devas kolekti, ne facila estas la tasko.

Gesamideanoj! Vere, estas ne facile por niaj Kovnaj amikoj! Jen estas okazo por montri la veran amikecon, la belan Esperantismon. Kiu volas helpi niajn s-anojn? Ni pensas, ĉiu. Per mono aŭ per libroj. La supre citita plendo montras al ni, kia granda malfelicite traŝis niajn Kovnaj amikojn. Helpu ni!

Ni ĉiuj povas helpi, unu multe, alia malmulte; sed nia devo estas helpi restarigi la societon kaj bibliotekon de niaj amikoj.

La „Haarlem'a Komitato por devastigitaj Esperanton“ volonte prenas sur sin la penon kolekti mon-kaj libro-donacojn. Oni sendu ĉion al s-ro E. de Wolf jr., Voorhelmsir. 2, Haarlem, Holando.

LA KOMITATANOJ:

J. W. Sevenhuysen, prezidanto;  
J. H. W. Habermeth, del. UEA.  
E. de Wolf jr.

Sed Dima, kvankam en lia kapo eble vagadis similaj pensoj, frapis per sia kruĉo la tablon kaj ekkriis:

„Cu longe ankoraŭ vi estos insultanta, maljunulo? Prefere alportu al ni ankoraŭ po unu kruĉo kaj diru, kiel nun ni povas plibonigi la aferon!“

Jen kio plaĉis al ĉiuj, — ĉiuj vidis, ke la viro havas ambicion kaj spritecon. La Germano frapis Diman sur la ŝultron, la mastro alportis sur pleto ankoraŭ kvar kruĉojn.

„Nu, kiamaniere do nun ni povos sin atingi?“ demandis Dima.

„Provu kuratingi, eble vi sukcesos“, respondis la maljunulo. „Nun vi devas atendi semajnon, tiam forveturos alia ŝipego por emigrantoj. Aŭ se vi volas, pagu pli multe: baldaŭ foriros alia granda porpasagera ŝipego, vi povos aĉeti biletojn de la tria klaso. El Svedujo kaj Danujo multaj forveturas per tiaj ŝipegoj Amerikan por tie dungigi kiel geservistoj. Car laŭtame la Amerikanoj estas fieraj kaj liberamaj kaj ne volonte akceptas servistan oficon. Dume junaj Svedinoj kaj Daninoj en unu, du jaroj laborgajnas tie por si belan doton.“

„Eble, ĝi tro multe kostos“, diris Dima, sed Mateo lin interrompis:

„Timu Dion! Ĉu estas eble, ke virino nin atendos tutan semajnon? Ŝi tie pro larmoj konsumigos.“

Mateo prezentis al si, ke en Ameriko, ĉe al-bordigejo, tute same kiel en ilia vilaĝo, kie flosa transveturigas homojn trans la rivereton, la fratino restas sidanta ĉe la bordo kun sia pakajo, rigardanta la maron kaj ploranta. . . .

Mateo kaj Dima pasigis la nokton ĉe la samlandano. Matene li komisiis al sia konato, juna Svedo, aĉeti por ili biletojn kaj meti ilin en la ŝipegon, kaj je tagmezo ili jam troviĝis sur la maro.

(Daŭrigo.)



# Esperanta Kroniko.

## Bulgario.

La 11—15 julio okazis kongreso de tutbulgaraj junulaj neŭtralaj abstinencaj societoj (I.O.G.T.N.) en urbo SLIVEN (Suda Bulg.). En unu el siaj kunsidoj oni alprenis la rezolucion unuaniman, ke Esp., kiel lingvo, kiu taŭge servus al la abstinencia movado, estas rekomendata por ellernado al ĉiuj anoj de la abstinencia unuigo per malfermo de kursoj, paroladoj ktp.

Jen ankoraŭ unu forta organizacio, kiu konfesas la superecon de Esp. super aliaj lingvoj. La prez. de Plevena abstinencia societo s-ro Jurukov petis pri adresoj de abstinenculoj en ĉiuj landoj kaj pri specimejaj n-roj de naciaj abstinencaj gazetoj, propagandiloj, afiŝoj, sigelmorkoj ktp. Li mem lernas Esp. Por ke mi montru, ke Esp. vere meritas tian atenton, mi petas s-anojn-abstinenculojn akceli mian propagandon per alsendo de supre cititaj objektoj.

Eĉ mi penadas fondi poŝtistan grupon, en kio mi preskaŭ jam sukcesis. 7—8 p. eklemsis Esp. Ankaŭ eĉ turistaj unuigoj mi vekis intereson. Plevena turista societo „Studenec“ en sia oficiala organo akceptas tradukadojn el Esp. La nove fondita revuo „Juna Turisto“ proponis al mi fariĝi korespondanto per tradukado de turistaj artikoloj.

Ĉie kaj ĉiam mi propagandas; sed mankas al mi propagandiloj. Jen kial mi korege petas bonkorajn ges-anojn helpi al mi per alsendo de propagandiloj ĝiuspecaj: gazetoj, afiŝoj, flugfolioj, gvidlibroj, ĝvidfolioj, gvidplanoj, ŝlosiloj, lernolibroj, ilustritaj poŝkartoj k. a. laŭ adreso: S-ro Simo P. Simov, prez. de Esp. grupo „Esperanto“ en Pleven (Bulg.).

Ĉiuj Esp. gazetoj estas afable petataj represis.

## Estonio.

TALLINN. En majo 1919 ĉi tie estis fondita Estonia Esperantista Unuigo „Espero“ (adreso: Riiuliti 1. 6). Spite la malfavorajn kondiĉojn por laborado, kies ĉefaj estis manko de monrimedoj kaj lernolibroj, la unuigo estas sukcesinta iom kaj propagandi Esp. Nun ĝi kalkulas pli ol 80 anoj, havas bibliotekon de ĉ. 200 libroj kaj de 1 julio nunjara belan ejon, kie la anoj kunvenas ĉiutage por praktiki la lingvon, instrui la komencantojn ktp. Forte malhelpas al la propagando absoluta manko de lernolibroj, kies presado en Estonio estas nebla pro teknikaj kaŭzoj.

## Germanio.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ! En la germana ŝtato Hessen la nedeviga instruado de Esp. en la lernejoj nun estas permesata kaj eĉ rekomendata per dekreto de la Landa Oficejo por Edukado.

En la sekvonta numero de ET ni publikigos detalan artikolon de nia s-ano Pfaff en Worms (Hessen) pri tiu ĉi temo.

## Hungario.

BUDAPEST. La 12 sept. aranĝis la IX-a distrikta laborista grupo tre bone organizitan ekspozicion en ties laborista hejmo. La aranĝintoj meritis ĉiun laŭdon.

De 11—20 sept. estis la VI-a Specimena Foiro de Budapeŝto en la industri-halo, kie estis malgranda E-ekspoziciejo kun flagoj kaj multloke E-afiŝoj. F-ino Anna Strasser konstante dum tutaj tagoj sengeŝtiste deĵoris kaj donis klarigojn al intereseuloj; 15 kursoj anoncis sin tie.

Gazeto „Meza Danubo“ (V. Zoltán u. 10) eldonis pri E hungarajn glumarkojn, kiuj anoncas, ke „M. D.“ per E-servo ricevas komercajn sciigojn el ĉiuj landoj.

En laborista societo s-ro E. Sturm komencis kurson.

Libro-eldonejo „Kultura“ presigas novan E-lernolibron verkitan de s-roj Paulo de Lengyel kaj d-ro K. de Kalocsay.

En oktobro la B'psta grupo aranĝos liter-vesperon; oni bonvolu sendi lerojn kaj poŝkartojn al bibliotekisto de Landa Societo (Jenő Szabó, VII, Dohány utca 16, I.).

## Litovio.

KOVNO. Prez. de Kovna E-Societo P. Medem faris la 19 kaj 25 julio propagandajn paroladojn por geinstruistoj. Cesis ĝis 150 p. Estis disvendataj multaj lernolibroj kaj vortaroj. Malfermiĝis 2 kursoj kun 40 p. sub gvidado de s-roj P. Medem kaj J. Mačernis.

MAKSVCICIAI (vilaĝo). S-ro B. Duda energie propagandas E inter vilaĝanoj. Kurso kun 15 p.

MARIAMPOLIS. Kurso kun 16 p. sub gvidado de f-ino Sofio Kelson.

# Parolejo.

(Je libera dispono de ĉiu abonanto.)

## 17.

### KAPTITEJO!

La 25 sept. du samideanoj el la Kapitejo Merseburg donis al mi gazeton kaj librojn Esperantajn kaj aliajn, ĉar la plej multaj hejmenvereturis Ruslandon. Mi volonte estas preta sendi tiujn gazetojn kaj librojn al aliaj kapitejoj laŭ peto.

MANSFELD, Merseburg, Wilhelmstr. 4.

## 18.

### PRI „LJOKO“ (respondo al parolo 16).

La letero de s-ro Atanasov en n-ro 5 de ET kaj la aldonita rimarko de la redakcio pri tio, ke la rusoj kvazaŭ estas instruitaj elparoli „ljoko“, estas bazitaj sur miskompreno.

En la rusa fonetiko ne ekzistas sono respondanta al la E-a kaj ĝenerale okcident-eŭropa I, anstataŭ ĝi troviĝas du aliaj, nur iom similaj sonoj, kiujn oni kutime nomas „malmo“ kaj „mola“. La unua ne havas respondejon en aliaj konataj neslavaj lingvoj, ĝi iom proksimiĝas al la E-a ŭ kaj kuŝas ie inter ĉi tiu kaj la sono de H en la angla vorto „will“. La alia, „mola“ I similas la hispanan H aŭ la italan G, sed ĝi ne havas post si la sonon de J. kvankam oni uzas ĝin ĉi tie lastan literon por ĝia transskribo per la latina alfabeto, skribante „li“. Ĉiokaze la „mola“ rusa I estas pli simila al la E-a sono; tial estas nature, ke oni elektis ĝin por proksimume prezenti la lastan al la rusaj lernantoj. Ĝi tamen ne havas apartan signon en la rusa alfabeto; la litero I, same kiel preskaŭ ĉiu alia rusa konsonanto, estas prononcata „mole“, se post ĝi venas aŭ speciala litero, t. n. „signo de moleco“, aŭ ĉi „mola“ vokalo, t. e. litero, kiu, se antaŭa konsonanto estas prononcata kun J (oni nome havas apartajn literojn por ja, jo, je, ju). Tiu ĉi sono J perdis, se la konsonanto moligas, t. e. la J-o fariĝas I-o, kie „li“ signifas nur moligitan I, sen la sono J.

Mi ne havas ĉi tie la lernolibron de Saharov, pri kiu estas la demando, kaj ne povas konstati, per kiuj rusaj literoj la vorto „loko“ tie estas transskribita. Povus esti du manieroj: an I (= signo de moleco) — a — k — o, aŭ I — j — o — k — o. Tial kombinaĵoj, latine transskribitaj, vere aspektas kiel la „ljoko“ de s-ro Atanasov, la rusa tamen ne elparolos ĉi tiu „ljoko“, sed kiel super dirite „li-oko“, se oni volas uzi „li“ por reprezenti la mojan rusan I.

Tia prononcado certe ankaŭ estas malbona, sed ĝi dependas de la natura, nacia malfacileco, venkebla nur per ekzercado kaj ĉi tiu limado de ĝuste elparolantoj. La aŭtoroj de lernolibroj ne havas en la rusa lingvo rimedon por pli preciza redono de la ĝusta sono.

La tuta demando i. a. estas bona ilustraĵo de la fakto, ke la prononcado de Esperanto tute ne estas pli facila por la slavoj ol por aliaj popoloj, kiel kelkaj ŝuldis eĉ ankoraŭ saĝnas opinii. G. Cernohostov.

## 19.

### MALABONO.

Ĉar vi en ET ĉiam denove spite la decidon (?) de LK (?) presas Aŭstrio, Belgio, Anglio ktp. anstataŭ -ujo, mi malabonas la ĵurnalon. Aliaj ĉi tieaj abonantoj ankaŭ malabonos la ĵurnalon. Deflankiĝoj de f' fundamento (?) ni ne partoprenas. Saluton!

E. KIRCHNER, Chemnitz (Germ.), Charlottenstr. 5.

(Ni ĝojas konstatante, ke ne sole ĉi tiu malabono restis la sola, sed ke el Ĉ. eĉ alvenis plia abonanto. — Red.)

## 20.

### KRITIKO PRI ET.

E. S. Mi kredas, ke la sekvantaj rimarkoj pri la lingvaĵo de ET estus utilaj, „ĉagrenigas nin“ devus esti „ĉagreni“, se ĝi ne signifas „ĝas nin ĉagreni“ (aliajn homojn). „ĉagreni“ estas transitiva; „manko da loko“ inter dikaj linioj malsupre de la paĝo kredeble devus esti „manko da spaco“, kiel vi skribas aliloke. La ĝusta signifo de „takso“ laŭ la fundamento ne estas „prezo“. Tial mi skribis „poŝtprezo“ en la letero, kies apero en la sept. n-ro ĝojigis min. „Denonci“ (en la Letero el Liverpool) devus esti „publike riproĉigi“, „denunsi“ havas alian signifon. Mi ne trovas, ke „denonci“ estas internacia. Tro similaj formoj estas evitindaj. Ch. G. Stuart-Menteth.

(Ni ĉiam plezure akceptas seriozajn kritikaĵojn, por kiuj ni kore dankas. — Red.)

## 21.

### SAĜA DECIDO.

„Juneco“ ne plu aperos! Ni ĉesigos ĝin, ĉar tion konsilas al ni multaj esp. eminentuloj. Esperantujo havas tro multajn gazetojn! Tio estas ĝenerala plendo. La gazetoj konkuras unu la alian. Kvankam precipe la ĵurnalo bezonegas bonan organon, tamen la „Juneco“ estas ankoraŭ tro fraa entrepreno. Ni esperas, ke nia „bela sono“ iam pli malfrue estos realigebla.

Jen efektive saĝa decido! La malsukcesoj de „Juneco“ oni cetere jam povis antaŭvidi, legante la unuan numeron. En ĝi la eldonantoj skribis, ke ili bezonas mil abonantojn. Mi antaŭdis, ke ili eĉ ne havos cent. Sed ĉi oni devas bedaŭri la senutiligon de la unaj fervoruloj; pro la bona silo, je kiu ili maŝtritis la lingvon, kaj pro la konscienco, tute senarata presado de ĉi tiu revuo. La triono de la Esp. gazetoj ja estas plenplenaj de malbonstila teksto kaj de amaso da preseraroj. Estus dezirinde, ke tiuj ĉi gazetaĵoj sekvus la ekzemplon de la bona „Juneco“, por ke restu nur tiuj gazetoj, kiuj efektive meritas esti abonataj pro sia bona silo kaj korekta presado.

Mi esperas, ke la ĵurnaloj, kiuj agas eldonantoj de „Juneco“ post la senutiligo ne ankau perdonas la kursojn sed disponigas sian valoran forton plue al la propagando de Esp. precipe inter la ĵurnaloj. T. I.

Ni posedas ankoraŭ kelkajn parolojn pri la landnoma finiĝo, kiujn ni povas publikigi nur en venonta numeroj.

# Recenzejo.

## GAZETOJ.

Ni konfirmas la ricevon de jenaj gazetoj:

Amerika E-isto, julio-aŭg.; Bulgara E-isto, junio-julio; E-a Finnlando, julio, aŭg., sept.; E-ista Laboristo, aŭg.-sept.; Esperanto, julio-aŭg.; Esp.-Itala Revuo, majo-aŭg. (kvartala n-ro); E-Mittelungen Graz, 20 aŭg.; E-Praktiko, aŭg.-sept.; Esperantsky Zpravodaj n-ro 1; Espero Katolika, jul., aŭg.-sept.; Germana E-isto, aŭg.-sept.; Hispana E-isto, jan. ĝis majo (5 div. n-roj); Kalifornia Folieto, majo-julio; Kristana Espero n-ro 2; Laboro, sept.; La Revuo Orienta, jun., julio; La Suda Kruco, julio; La Verda Ombro (Taihoku), junio; Le Monde E-iste, julio-aŭg.; L'Esperanto, aŭg.-sept.; Literaturo, julio-sept.; Monata Bulteno de „Apliko“ E-grupo, junio-julio, aŭg.; Nua Folieto, julio, aŭg.; The British E-ist, sept.-okt.; Verda Litojio, julio, aŭg.; O Socialista n-roj 18-20; Esperantida, aŭg.-sept.; Letras (Cordoba), julio; Kószép Duna, 20 aŭg.; Peace and Goodwill, julio.

ESPERANTSKY ZPRAVODAJ, Praha II, 2052. — Nova gazeto nur en bohema lingvo, kiu volas nur informi pri Esp. Eldonantino: Julie Supichová.

LA SUDA KRUCO. Organo de la aŭstral. E-istoj. N-ro 1, julio 1920. Box 1367, Elizabeth-st. P. O. Melbourne. — 8-paĝa folieto en angla kaj Esp. lingvoj, kun raporto pri la sukcesplena tria kongreso de la aŭstralaj E-istoj en Sidney kaj kun fotokopio de la kongresanoj. La presero ankoraŭ ne posedas la superecon kaj uzas laŭfundamente la anstataŭantan literon „h“. Ni tre ĝojas pri la apero de Esp. gazeto en Aŭstralio; supozeble ĝi multe akcelos nian aferon en la malproksima „insula kontinento“.

VERDA LITOPIO. N-ro 1, julio 1920, 5265. Lehtomaa 7-Come Minami-ku, Osaka, Japanio. — Nova monata revuo nur en E. kun interesaj artikoloj kaj rakontoj klarigitaj per ilustraĵoj karakterecaj por Japanio. La silo estas komprenebla sed parte stranga, kio estas atribuita al la tute diferenca (de eŭropa) pensmaniero de Japanio. Preso kaj aranĝo plaĉas. Al kalkulaĵoj-samidantoj la revuo estas utila por konvinki skeptikulojn pri la disvastigado de Esperanto.

RIA. Rio de Janeiro, 28 junio. — Grandeg-formata tag-ĵurnalo, represis la artikolon „La tutmonda ĉefurbo“ de Iv. H. Krestanoff, kun ilustraĵo kaj kun konsidero de la tradukinto, el la spec. n-ro de ET.

FRANKFURTER MESSZEITUNG (organo de la foiro de Frankfurt). 1-a specialnumero, 25 sept. — Tre ĝojigis nin bonega artikolo de s-ano Kreuz pri „La mondlingvo en la servo de la foiro“ en tiu ĉi gravega numero. Ĉerte la artikolo aliflors la intereson de multaj seriozaj personoj, precipe de komercistoj kaj industriistoj, al nia movado.

MANZER JOURNAL, Mainz, 15 sept. — Informas, ke la Landa Oficejo por Edukado permesis kaj rekomendis la nedevigan instruado de Esp. en la lernejoj de Heslando.

NATIONAL-ZEITUNG (grava tagĵurnalo). Basel, 5 aŭg. Skribas pri la Kongreso de la Dua Internacio interalie: La irado de la kongreso estas iom treniga, malĝoja. Ĉerte tio estas plejparte kaŭzata per la trijfoja ripetado de ĉiuj paroladoj, Internacia mondlingvo eble devas iam fariĝi normo de ĉiuj kongresoj.

VOLKSZEITUNG, Bydgoszcz-Bromberg, 29 aŭg., 5, 12 kaj 26 sept. Organo de la socialdemokratia partio de Polio. Enhavas informojn pri kaj tradukoj el Esp., interalie el ET: „La urbo de la homaro“ de Karinty, plue la ĉef-artikolon el la spec. n-ro por la foiro de Frankfurt.

## LIBROJ.

OFICIALA JARLIBRO 1920 de UEA, Bern, Museumstr. 14. Ampleksa libro de 182 kaj 60 paĝoj, kun kalendaro, enciklopedio, artikoloj pri esperantismo kaj UEA, adresaro de la UEA-delegitoj, de grupoj, korespondemuloj, kaj kun multaj anoj. La libro certe estas praktikige manlibro por ĉiu E-isto kaj bonega ilo por varbi novajn adeptojn al E kaj novajn anojn al UEA.

OFICIALA DOKUMENTARO de la 6-a Kongreso de UEA en Hago 1920. 100 p. — Enhavas 40-paĝan nekrologon-biografion verkitan de s-ro Stettler pri la mortinto de UEA, precipe pri la fondinto Hector Hodler, plue administrajn raportojn kaj la novan statuton de UEA.

La aliajn duoble ricevitajn librojn ni recenzos en sekvantaj numeroj.

# Filatelistoj!

Mi serĉas interŝanĝon. Speciale en novaĵoj de Svedio, Baliko, Sudameriko ktp. Mi donas hungarajn kaj ĉeĥoslovakajn markojn. Marko por marko aŭ per Michel katalogo.

Ne sendu senvalorajn kaj mankajn markojn. Unuarangaj referencoj.

S-ro Endre Hevesi, Budapeŝt, Teréz körút 30.

# Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

## LUNIA LETERO EL STIRIO.

Mia Usona kolego skribis en siaj monatleteroj pri la vivkostoj en sia lando kaj plendas pri terure altaj prezoj. En mia lando la ŝtato estas ankoraŭ pli malbona.

Ni estas sen iaj nutraĵoj. Stirio estas montara lando; jam antaŭe, kiam la suda parto — nun Jugoslavio — ankoraŭ apartenis al ĝi, ne povis vivi de si mem, sed devis importi la plej necesajn nutraĵojn. La forigo de la plej fruktodonaĵoj regionoj de la lando al Jugoslavio tute dependigas Stirion de la eksterlando. La plej necesajn nutraĵojn oni tial nur ricevas laŭ kartoj; kiom, montras la jena:

17½ dkg da pano potage,  
50 dkg da faruno (duaklasa) posemajne,  
12 dkg graso posemajne.

La prezoj estas jenaj: Bulo da pano 4,96 Kronoj (0,20 K. antaŭ la milito), 1 kg da faruno 12 K. (0,40 K. antaŭ la milito), graso 1 kg 150 K. (antaŭ la milito 0,70 K.) Snoj kostis antaŭe 10—15 K., nun 600—1000 K. kaj pli; porvira vestaĵo antaŭe 60—100 K., nun 5500—7000 K. kaj pli. La plikostiĝo de ĉiuj vivbezonaĵoj ne estus tiom sentebila, se la salajroj same estus pliigitaj. Komerc-komizo ricevis en 1914 ĉ. 80—120 K. monate, nun 800—1200 K. Responde al la multekostiĝo de la vivbezonaĵoj pliigis nur la salajroj de laboristoj, almenaŭ parte: permana laboristo proksimume en semajno ricevas tiom, kiom perkapa laboristo en monato.

La registaro devas aĉeti ĉiujn nutraĵojn en eksterlando. Ĝi vendas ekz. la farunon malpli multekoste, ol ĝi aĉetis ĝin. La manko devas esti alimaniere rebonigata, kaj tial oni ĉiam devone postulas novajn impostojn. La nenion valoranta valuto kaj aliaj faktoj estas kun la supre cititaj la kaŭzo de ĉiam denova plikostiĝo.

En printempo montrigis stranga fakto. Dum la pasinta aŭtuno kaj vintro estis tiom aĉetata, la komercistoj multegon profitis. Sed per tio ankaŭ estis ĉesigata la aĉetpovo de la publiko. De post Pasko preskaŭ ĉiu komerca vivo ekhaltis. Plej tuŝataj de tio ekhaltis estis la tekstaj kaj led-industrioj. La spezo de kelkaj entreprenoj malaltiĝis ĝis 10% de la spezo de Decembro 1919. Sekvis prezmallaltiĝo. Kaj samtempe novaj postuloj de laboristoj. Nur nun, de la komenco de pli malbona tempo, tomete revivigis la komerco.

La rilko en Sirio estos malbonega. En tre multaj regionoj peregis hajladoj, superakvegoj ktp. preskaŭ la tutan rikolon. Kaj inter la bovoro estas gravega epidemio; en mallonga tempo peris pli ol 500 bovoj.

En printempo la valoro de la aŭstria Krono iomete altiĝis; nun, ĉar la eksterlando deziras aĉeti lignon kaj aliajn produktaĵojn de nia industrio, tago post tago malaltiĝas la valoro de nia mono en Zürich. Tiamaniere unu rado moviĝas la alian, altiĝas la prezojn, kaj ni ne scias, kiam tio finiĝos. Ni nur scias, ke venos vintro pli terura ol la pasinta, kaj, se ne baldaŭ ŝanĝiĝos la situacio, venos la fino.

JOSEF MADER.

#### LINGVA LETERO EL POLIO.\*

Doŭbla povas esti la kaŭzo de multekosteco: malgranda provizo da komercaĵoj, aŭ tro granda amaso da mono. En Polio tiuj ambaŭ kaŭzoj laboras samtempe: la milito detruis amason da vilaĝoj kaj urboj, fabrikoj kaj laborejoj; la sama milito devigas la ŝtaton eldoni grandegajn sumojn por ĝia gvidado. La funton por tiuj elspozoj donas la presaro. Ni fleksiĝas sub la superfluo de banknotoj, kiuj kiel la kambioj estas eldonitaj de la registaro en grandaj amasoj, kambioj, al kiuj mankas la kontanto kaj per tio des pli malmulte valoras. Ĉe ni (en Grand-Polio) por tiel diri fariĝis la mono malkara, kio, observate de la komerca vidpunkto, ŝajnas ĝia kariĝo.

Kiel oni mezuras la fluaĵon per liron kaj la pezon per funto, tiel ankaŭ ni kutimiĝis mezuri la valoron per mono. Do la mono estas mezurilo, kaj kiel tiu ĝi estas aŭ devus esti almenaŭ ne ŝanĝebla. La milito kaj la tro granda presigo de paperno kaŭzis ĉe, ne nur ĉe ni, ke la mono finis esti la sama mezurilo kiel antaŭ la milito. Ĉiuj iamaj monmezuriloj ŝanĝiĝis, sed tamen restis la nomoj, ni nomas ilin plu: funto, franko, liron, marko ktp. En plej malbona situacio troviĝas la pola marko, ĉar ĝi aperis sur la mondo sen ia alia metala anstataŭo, kaj pruvas grandan pligan forton, ĉar el ne multaj cent milionoj, eldonitaj dum la registaro de Beseler, pliiĝis hodiaŭ ĝis kelkaj dek mil milionoj. Do la pola marko pliiĝante de l' tago al tago, fariĝas ankaŭ ĉiam pli malkara, kion ni ekkonas kiel multekosteco de komercaĵoj, same ĉiam plialtiĝante. Meze ĉiu Grand-Polano ne ekkonas tion. Ĉie li serĉas la ŝuldantojn en la kamparano, komercisto, metisto kaj laboristo. Ofte oni aŭdas reciprokajn kulpojn el diversaj klasoj. Kulpiĝo ne prava! Tute same kiel la termometro, montrante la varmecon, kulpiĝas la somerono, ke estas varmege.

La tiel nomata multekosteco, aŭ alie dirante, la ĉe malalta valoro de la mono estas aporo, kiu neniu klaso ŝuldas. Tiu "multekosteco" estas rezultato de nia tuta politika kaj ekonomia situacio. Kuraci ĝin povas neniu ordono, neniu leĝo. Ni mem devas kuraci ĝin. Ni devas labori tre profite, vivi spareme, kiel plej/mal multe importi el eksterlando kaj tien plej multe eksporti. Tiamaniere oni post iom malgrandiĝos la amaso de kursanta mono, kio faciligos la rekonstruadon de prezoj pli akcepteblaj ol momente.

Sed kiel aranĝi tion nuntempe? Kongres- kaj Malgrand-Polio kutimiĝis tre facile al la mona malakreco; alie dirante, tie ekzistas terura multekosteco, komparata kun tio de Grand-Polio. Tamen estas fakto, ke krom kapitalistoj kaj oficistoj neniu plendas tie pri la multekosteco. Kongres- kaj Malgrand-Polio superŝulditaj de polaj markoj, kolektas trezorojn, per kiuj ili poste superŝutas Grand-Polion. Kontraŭ tio devas Grand-Polio defendi sin; kaj ju pli forte ĝi batalas kontraŭ tiu superfluo de senhonesto konkurenco flanke de aliaj regionoj, des pli frue ĝi fariĝos la plej riĉa, kiu ĝi jam hodiaŭ estas, pensante ne al la mona sed reala provizo.

FR. PRENGEL,  
Bydgoszcz-Bromberg (Polio)

\* Polio konsistas el tri partoj: la iama rusa teritorio, nomata Kongres-Polio, — Galicio, la iama Aŭstria parto, nuntempe nomata Malgrand-Polio, — kaj iama germana provinco Posen, kaj Orienta-Prusio, kun la nuna nomo Grand-Polio.

#### NIA MONATA LETERO EL LISONO.

La plej grava labor-okazintaĵo estis la aligo de salajroj de la fervojistoj donitaj de la Federala Fervoja Komisio. La fervojistoj petis altiĝojn, kiuj egalus ĉirkaŭ 1200000 dolaroj jare; tamen la komisio donis al ili 600000 dol. La fervojistoj unue diris, ke ili ne akceptus tian sumon kaj ekparolis pri nacia striko, sed post konferenco de iliaj reprezentantoj ili akceptis la donitajn salajr-altiĝojn, sed nur por periodo de ses monatoj, kaj post tiu tempo ili ree petos pli da mono.

La vera kialo de illa akcepto sen striko estis pro la nuna publika opinio, kiu certe ne subtenos fervoj-strikon; ĉar la popolo kredas, kaj vere, ke multaj de la altaj prezoj estas kaŭzitaj de fervoj-kaj aliaj strikoj. Kaj neniu en Usono povas sukcese striki sen la publika opinio je sia flanko.

La tuja sekvo estis la altiĝo de pasaĝer-, ŝarĝ- kaj lit-tarifoj de 25% ĝis 50% laŭ ŝtataj grupoj. La altiĝo estas pli alta por la litvagonoj 50%, ŝarĝ-tarifoj ĉirkaŭ 35% kaj pasaĝer-tarifoj 25%. Entute la altiĝo estas pli multa en la nemulthoma okcidenta parto de Usono kompare kun la multhomaj orientaj ŝtatoj. Nu, kiu gajnos? Dum

tempo la fervojistoj gajnos je la kosto de la publiko. Sed la fervojistoj estis parto de la publiko kaj repagos preskaŭ tuj la plimulton de tio, kion ili gajnos pro la altiĝo de la vivkosto!

Post tempo aliaj industriistoj gajnos altiĝojn de siaj salajroj, kaj la fervojistoj estos en la sama ekonomia situacio kiel antaŭe.

La vera ekonomia sekvo de ĉio-ĉi estos, ke ni ĉiuj gajnos pli da mono kaj elspozos pli da ĝi, alivorte, ke nia mono perdos iom da sia aĉet-povo. Ree mi demandas: kiu gajnos?

Estas la sama rakonto pri la vivkosto; ĝi daŭras esti alta, precipe la mangajloj, pro la samaj kaŭzoj, pri kiuj mi skribis en miaj antaŭaj leteroj.

Tamen la kosto de ŝuoj kaj ledajoj iom malaltiĝis, kaj la prezoj en la ŝubutikoj estus pli malaltaj, se ili ne havus tiom da ŝuoj, kiujn ili aĉetis je altaj prezoj, opiniante erare, ke la prezo de ŝuoj de monato al monato estus pli alta. Kiam ili vendos tion, kion ili havas kaj replenas siajn bretojn de novaj malplikostaj ŝuoj, — la prezoj ree malaltiĝos.

Du partioj nun batalas por la voĉoj de la popolo. Ili estas la Respublika Partio, kies kandidato Senatano Harding de la ŝtato Ohio estas kontraŭ la Ligo de Nacioj kaj por la altiĝo de la imposto. Ŝtatestro Cox, ankaŭ de la ŝtato Ohio kaj kandidato de la Demokrata Partio, volas ke Usono estu ano de la Ligo de Nacioj kaj ne volas ke la impostoj estu altiĝitaj. Ambaŭ estas redaktoroj de ĵurnaloj, kaj oni povas senhezite diri, ke la estonta respublikestro de Usono estos redaktoro.

Ekzistas tri aliaj partioj, la Socialistoj, kies kandidato estas Eugene Debs, nun en Federala Malliberejo pro siaj paroloj dum la milito kontraŭ la registaro kaj la mondmilito, la Kontraŭalkohol-istoj, kaj nia plej nova partio, la Farmist-Laborista Partio. El la tri lastaj la socialistoj sendube estas la plej fortikaj. Ilia kandidato eble ricevos du milionojn da voĉoj.

Dum la monato julio komitato de la Usona Parlamento vizitis ĉe San Francisco kaj ĉirkaŭaj urboj por esplori la disputon inter la japanoj kaj la anoj de la pacifika marbordo.

Antaŭ kelkaj jaroj la registaro japana promesis ke ili ne donos permeson al japanaj laboristoj iri al Usono, kaj efektive ili ne donis permeson, sed spite ĉion-ĉi la nombro de japanoj pli kaj pli kreskas.

La japanoj nun okupas aŭ posedas milojn da hektaroj de la plej bona lando. Fakte kelkaj vilaĝoj, kie nur Usonanoj vivis antaŭ dek jaroj, estas okupataj de japanoj kaj nur kelkaj Usonanoj. Oni informas la komitaton, ke la plimulto de japanaj laboristoj, kiuj venas en Usonon, venas tra Meksiko, kelkaj de tempo al tempo envenas de la ŝipoj, kiuj vojaĝas al San Francisco kaj Seattle. Oni diras ke ekzistas sindikato por helpi la japanojn trans la landlimon kaj ke oni transportas ilin ŝipe al San Diego kaj eĉ al San Francisco en malgrandaj petrolŝipoj.

La kontraŭstaro de la Usonanoj ĉe la pacifika marbordo estas kaj ekonomia kaj rasa; ekonomia: ĉar la japanoj laboras je pli malaltaj salajroj ol kaŭkazanoj, ĉar ilia vivsistemo kostas malpli, kaj rasa: pro la fakto ke kaŭkazanoj kaj azianoj ne interfariĝas kaj ne povas interdeziĝi.

Alia kaŭzo de la malkonsento estas, ĉar la japanoj havas tiom da geoidoj, norme multe pli ol Usonanoj, kaj la timo ke post kelkdeko da jaroj la nombro de japanoj superos la kaŭkazanojn, kiel jam okazis en la Teritorio de Hawaii. Helpas ankaŭ la opinio de japanoj, ke iliaj infanoj naskiĝas en Usono estos ĉiam japanoj (laŭ la japanaj leĝoj) kaj ke la infanoj estas instruitaj en privataj japanlingvaj lernejoj adori la Mikadon kaj la landon de Japanujo. Tamen multaj opinias ke la japanoj naskiĝas en Usono vivos kiel Usonanoj kaj subtenos niajn instituciojn, kaj multaj diras ke la japanoj starigis bienojn el antaŭ dezertoj, kiel en Suda Kalifornio, kaj el marĉoj kiel ĉirkaŭ la urbo Sacramento, kaj ke ili vivas morale kaj laŭ la leĝo, kio estas vera. Ŝtatestro Stephens petis al la senatanoj ke ili faru novan leĝon, kiu ne permesos al japanoj aŭ iliaj geoidoj posedi landon en Kalifornio.

Dum la unua semajno de aŭgusto vizitis ĉe San Francisco por tri tagoj vaporŝipo kun 780 rusaj infanoj, kiuj devenas precipe de la urboj Petrograd kaj Moskva kaj ĉirkaŭaj provincoj. La Usona Ruĝkruco prizorgas ilin.

Dum la Kerensky-regado iliaj parencoj sendis ilin for de la urboj, ĝis kiam la milito en Rusujo ĉesus. Sed post la Bolŝevika revolucio la infanoj estis portataj en Siberion, kaj post tempo Generalo Kolčak protektis ilin, sed poste petis la Ruĝkrucon prizorgi ilin.

Unue la Ruĝkrucoj nenis sendi ilin pere de la transiberia fervojo, sed ne sukcesis fari tion pro la tiama milito inter la ĉeĥoslovakoj kaj la bolŝevikoj.

La soja rimedo estis vojaĝi trans la Pacifikan Oceanon, tra la Panama Kanalo, trans la Atlantikan Oceanon, la Nordan Maron al Petrograd, preskaŭ 35000 km.

Kiam ili estis en San Francisco, la urbo festenis kaj bone prizorgis, ke ili havu ĉion, kion ili volis.

En Siberio kaj surmare ili havis regule instruadon de rusaj instruistoj.

A. S. Vincent, San Francisco.

## S-ro James A. Meagher

petas pardonon, ke li ne povas tuj respondi al ĉiuj petantoj pri Irlando, ĉar li estas preskaŭ superŝuldata de leteroj, poŝtkartoj ktp., sed al ĉiuj samideanoj li promesas respondi iom post iom. Li dankas ĉiujn helpantojn per ĉi tiu anonco.

## ESPERANTO-BRODAĴO

REKTE EL ĤINUJO.

Mi sendas per rekomendita poŝto belegan silk-brodadon memfaritan, kun surskribo ESPERANTO, LINGVO INTERNACIA, verda stelo ktp. Tre bone por enkadrigi. La plej bona kaj plej ĉarma Esp. propagandilo por la tutmonda esperantistaro.

15 : 20 cm aŭ 30 : 40 cm, 25 aŭ 45 resp.-kup. aŭfrankite. — Skribu en Esperanto al samideano C. S. Gee, Chotsarloon, Hai-Yen (Shanghai).

Multaj unuarangaj

## Reprezentantoj

deziras transpreni la reprezentadon de produkt-kapablaj firmoj de la moda, teksa, galanteria kaj papera branĉoj kaj de teknikaj artikloj.

Seriozajn proponojn peras la administracio de

## Meza Danubo

Hungara Komerc Revuo por la Eksterlando BUDAPEST, V, Zoltán-utca 10 (Közép Duna).

## Gazetposedantoj!

Kontraŭ pago mi deziras ricevi:

LINGVO INTERNACIA. I. jaro ĉiujn numerojn escepte 3, 6, 7; III. ĝis IX. j. ĉiujn n-rojn esc. 4, 7, 13, 21, 22; XI. j. ĉiujn esc. 4, 6—10, 14—21; XIX. j. ĉiujn esc. 1—7.

TRA LA MONDO. I. j. ĉiujn n-rojn esc. 1, 2, 6, 7; II. j. ĉiujn esc. 2, 3, 6, 7, 10, 11; III. j. ĉiujn esc. 1, 4, 5, 7, 8, 12; IV. j. ĉiujn esc. 1—3.

UNIVERSO. II. j. n-rojn 12; III. j. ĉiujn esc. 1, 5.

Faru proponojn al

Ivan H. Krestanoff, Schumannstr. 31, Dresden-A (Germanio), post 15. okt.: Pirdop (Bulgario).

## Anoncetoj.

AĈETO. Tom A. Allan, 91 Prud'homme Ave., N. D. G. Montreal, Kanado deziras aĉeti la vortaron de Kabo.

FERVOJISTOJ! Por propaganda poŝtkart-ekspozicio mi petas alsendon de stacidomaj vidaĵoj kaj de fervojaj konstruaĵoj. Al ĉiuj mi resendos Pl. Mi ankaŭ korespondos. Georg Habelok, Breslau 10 (Germ.), Schleiermacherstr. 19.

FILATELIO. Estonajn poŝtmarkojn purajn kaj ŝtampitajn mi vendas. Antaŭpago. Deziras interŝanĝi papernomon. I. Vahikeri, Luusitalu 5, 11 Tallinn, Estonio.

FRÄULINO aŭ virino kun serioza karaktero tuj serĉata por la gvidado de la mastrumado de familio kun 3 miljunaj personoj. Mansfeld, Merseburg/Saale (Germ.), Wilhelmstr. 4.

INTERŜANĜO. S-ro G. Bochicchio, viedel de UEA. Potenza (Italio), deziras interŝanĝi il. PK, nacilingvaj il. Ĵurnalojn kaj neuzitajn PM.

INTERŜANĜO. S-ro Ignatz Wallner, Siempfergasse 8, Graz, interŝanĝas PM.

INTERŜANĜO KAJ KORESPONDO. Leono Funken, Florinsmarkt 7a I, Koblenz (Germ.) deziras interŝanĝadon de helpa (milita) mono (sole biletoj) kaj vendon de sia kolektaĵo. Li ŝatus ankaŭ korespondadon per Angla kaj Franca lingvoj kun allandaj ĝes-anoj, precipe bankistoj.

KORESPONDANTOJ. S-ro J. Mader, bei O. Partl, Rauber-gasse 3, Graz, serĉas korespondantojn en ĉiuj landoj por Porgazetara Esperanto-Servo.

KORESPONDO. F-ino Olga v. Calisto, Spärbersbach-gasse 3/II, Graz, per leteroj kaj il. PK, kun ĉiuj landoj.

KORESPONDO. S-ro H. Hammerschmidt, Plabutschcher Schlössel, Götting bei Graz, kun sendefendaj telegrafistoj ĉiulandaj.

KORESPONDO. Fraŭlinoj, anoj de gimnazio kaj komerc-lernejo, deziras korespondadi per il. PK, kaj L kun gesamideanoj, Respondon ĉiu ricevos. D-ro L. Györy Nagy, del. de UEA, Miskolc, Remenyin 4, Hungario.

KORESPONDO. S-ro Kaue Suuronen (tipografo), Helsinki (Finnlando), Antinkatu 11, rp H, ovi 19, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per L, PK, il. PK, kaj gazetoj.

KORESPONDO. Francisko Prengel deziras interŝanĝi ĉiulandajn E-gazetojn; korespondas per PK il. bildflanke, ĉiam respondas. Adr.: Bydgoszcz-Bromberg, Podgórze 17, Polio.

KORESPONDO. Karel Poupey, Dampoortstraat 21, Sint-Kruis (Brugge), West-Vlaanderen (Belgio), 19-jara tribunalo-officisto, korespondas L kun ges-anoj pri filozofiaj, sociaj kaj politikaĵoj temoj, PK kaj L kun fraŭlinoj pri ordineraĵ temoj.

KORESPONDO. Pedro da Ressurreição, Polícia Marítima, Lisboa (Portugalio), deziras korespondi kun tutmondaĵ gesamideanoj — ĉiam respondos.

KORESPONDO. Simeon M. Simeonoff (dom Iv. Kristoff, fotografisto), Pleven (Bulgario), interŝanĝas PK, PM, kaj korespondas precipe kun amerikaj samideanoj.

KORESPONDO. Germanio, Chemnitz, Barbarossastr. 8, E. Klemm, sup. instruisto, petas negermanajn kolegojn alsendi bildkartojn de ilia lernejo. Mi respondos sammaniere.

KORESPONDO. Hellmuth Paul, Schwarzenberg (Germ.) deziras ricevi PM, kaj il. PK, de ĉiuj landoj de la tero.

KORESPONDO. Otonar Swoboda, Berlin W 87, Katlerstr. 13, fraŭlo, 34-jara, deziras korespondi kun eksterlandanoj (spertaj Esperantistoj).